

Evoluiga asistanto – part-tempa kaj dehejma

Dejorhoroj: Oni antaŭvidas averaĝe po tri (3) horojn semajne, sed kelkaj semajnoj postulos pli da tempo.

Kompenso: 4000 USD jare, kontrakta posteno; mankos pago de imposto, sanasekuro kaj aliaj dungo-avantaĝoj. En Usono, IRS-formularo 1099 estos liverita impostociele. La kompenso estos negocebila, kiam la postulataj rezultoj kaj horoj superos la atendojn.

Loko: Laboras de hejme.

Estro: La ĉefdirektoro de Esperantic Studies Foundation (ESF).

Subtena teamo: La ĉefdirektoro kaj laŭbezone ESF-estraranoj.

Pri la organizo: Esperantic Studies Foundation (www.esperantic.org) estas tre malgranda neprofitcela organizaĵo, kiu funkcias de pli ol 50 jaroj. Nia donacantaro estas malgranda kun proksimume 50 anoj, ĉefe konsistantaj el Esperanto-parolantoj en Nordameriko. Donacoj estas uzataj por financi subvenciojn al kleruloj, kiuj studas mondlingvajn aferojn, edukon agadon kaj la konservadon de Esperanto-materialoj por esplorado.

Devoj:

1. Administri la datumbazon de donacantoj kaj:
 - a. Organizi dankojn al donacintoj. (Manskribajn al grandaj donacantoj. Retpoŝtajn por konfirmi la ricevon de donaco, sendatajn per Salesforce.org al ĉiuj.)
 - b. Sendi informojn por ĝisdatigi donacantojn pri interesaj subvencioj kaj agadoj.
 - c. Organizi, ke la estraranoj telefonu al elektitaj donacantoj, inkluzive la disponigon de fon-informoj kaj laŭtlegota teksto por la telefonvoko.
2. Pligrandigi la nombron de donacantoj kaj la donacitan sumon.
3. Konstrui rilatojn kun grandaj donacantoj kaj eblaj grandaj donacantoj.
4. Plani kaj efektivigi donaco-petajn kampanjojn.
5. Vastigi la donaco-celan uzon de sociaj komunikiloj, aparte atentante LinkedIn sed traktante ankaŭ Facebook, Twitter kaj eventuale aliajn sociajn retojn.
6. Konservu kaj raportu statistikon pri donacoj.
7. Helpi verki subvencio-petojn.

Nepraj trajtoj kaj kapabloj:

1. Havas sufiĉe da parolaj kaj skribaj kapabloj anglalingve.
2. Volas lerni pri monkollektado kaj la persona interagado, kiun tio postulas.
3. Kapablas pri sociaj komunikiloj (LinkedIn, Facebook, Twitter kaj eventuale aliaj komunikiloj).
4. Ĝuas planadon de, tekstoverkadon por, kaj efektivigadon de monkollektaj kampanjoj.
5. Scipovas krei monkollektajn materialojn (broŝurojn, afiŝojn, grafikaĵojn, fotojn, bildojn, ktp).
6. Kapablas varbi kaj instigi volontulojn por helpi en monkollekta agado.
7. Povas plani kaj efektivigi monkollektajn eventojn.

Dezirataj sed ne nepraj kapabloj:

1. Scipovo uzi Salesforce.org aŭ similan datumbazon por administri donacantojn.
2. Kapablo legi kaj skribi Esperanton baznivele. Flua parolado de Esperanto certe estos avantaĝa.

Diverseco kaj egaleco: Esperantic Studies Foundation kaj ĝia komunumo alte taksas kaj diversecon kaj egalecon. Tial ni forte instigas la kandidatigon de kvalifikitoj el iu ajn religia, etna, lingva aŭ kultura fono, kaj de iu ajn seksa identeco aŭ orientiĝo.

Bonvolu sendi sinprezenton kaj vivresumon kun monro de trajtoj per retpoŝto al admin@esperantic.org.